

Bulgaria ESPERANTISTO






Inaŭguro de memorplato sur la muro de la iama lernejo „Ekzarh Josif I“, kie estas fondita la Bulgara Esperantista Ligo (nun BEA) en V. Târnovo. Inaŭguran paroladon faris K. Vălev — sekretario de CK de BEA (vd. p. 10)



Junaj esperantistoj el lernejo „Sandor Petöfi“ en u. Ĥaskovo post partopreno en la tutpopola unuamaja manifestacio ĉi-jare



ENHAVO

* * Eterna nuntempulo	1
Ĥristo Botev. Ĉe la disiĝo en la jaro 1868	3
Mia preĝo	4
La kredo de la Bulgara Komunumo	4
Krâstju Karucin. La verkoj de Ĥristo Botev en Esperanto	5
Ĥristo Mindov. Kaliakra	6
Asen Grigorov. Kolomano Kalocsay	8
Kolomano Kalocsay. Sub Moskvo	9
Pri nia kor'	9
Al la bulgaraj esperantistoj	9
Cvjatko Todorov. Unu el la sindonaj esperantistoj-batalantoj	10
Nikola Najdenov. Brila jubileo de „Lumo“	10
Ĥristo Dolĉinkov. 80-jariĝo de E-societo „lumo“ en V. Târnovo	11
Minko Conkovski. Koncerto de Marija Angelova en Sofio	12
Vasil Mitovski. „Esperantista Printempo“ .	12
M. Zlateva. La Esperanto-flago denove levita en Etropole	13
Dimitrinka Koseva Aktiva kontraŭfaŝisma batalanto kaj esperantisto — popola elektito	13
* * * Omaĝe al Maksim Gorkij	13
* * * Vespere pri Ĥristo Mindov	13
M. Conkovski. Interdistrikta E-renkontiĝo en Samokov	14
Dimitro Denĉev. Ekspozicio de juna pentristino-esperantistino	14
Maja Gorova. Al la legantoj de „Bulgara Esperantis'o“	15
Vladimir Sapoĵnikov. Sukcesa komenco . .	16
* * * Sukcesa seminario „Esperanto kaj pop-muziko“	16
Sally Lomp. V-a TTV	16
Fzopo. Oraj ovoĵoj	III
V. Firsov, J. Luĉenok. De jarcento al jarcent' (kanto)	IV

Sur la kovrilpaĝo:

La taĉmento de la glora vojevodo kaj poeto Ĥristo Botev elŝipiĝis sur la bordon de Danubo apud v. Kozloduj

Pentraĵo de D. Gjuĝenov

Redakta Komitato: Kunĉo VĂLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BĂCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN Haim LEVI.

Administra sekretario kaj korektanto:

Minko CONKOVSKI

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

Partoprenantoj en la Interdistrikta E-Renkontiĝo en Samokov (vd. p. 14)



ETERNA NUNTEMPULO

Rilate al Hristo Botev historia distanco kvazaŭ ne ekzistas. Lia genia poezia verkaro kaj majesta batalheroaĵo igas lin samtempulo de ĉiu generacio. Jam cent jaroj forpasis ekde lia bravula morto en la fajro de la batalo, sed ĉiu bulgaro vivas kun la sento, ke Botev ĉiutage estas kun ni, ĉiumomente estas sentebla lia ĉeesto en la sorto de la patrolando, de la popolo, de la aparta individuo. Botev fariĝis nedisigebla konsista parto de la bulgara nacio.

Naskiĝinta kaj kreskinta en la familio de malriĉa popola instrutisto jam kun la patrina lakto li ensuĉis flamantan amon al sia sklavigita popolo kaj neestingeblan malamon al ĝiaj subpremantoj — otomanaj konkerintoj kaj bulgaraj riĉuloj-ĉorbaĝioj. En Odeso, kie Botev du jarojn studis en gimnazio, li varme brakumis la plej progresemajn ideojn de la rusa socio en la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento — la ideojn de la revoluciaj demokratoj Hercen, Ĉerniŝevskij, Dobroljubov.

Forpelita el la gimnazio fare de la reacia estraro, Botev fordonas sin la tuta al la batalo — ekiras la pezan vojon de elmigrinto en la liberigita jam Rumanio, la vojon de sindona batalanto. Li fariĝas unu el la ideologoj kaj strategoj de la bulgara naciliberiga revolucio. Sian inspiritan plumon de genia poeto, ĵurnalisto kaj agitanto Botev dediĉas senreste al la batalo de siaj fratoj-malriĉuloj — la ekspluatataj bulgaraj vilaĝanoj, meŝtistoj, popola intelektularo, kiuj soifis nacian liberon kaj socian justecon. La evoluo de liaj revoluciaj ideoj nature kondukas lin al la marksismo. Ne hazarde en la printempo de 1871 la parizaj komunanoj ricevis subskribitan de Botev telegramon: „Fratajn kaj elkorajn gratulojn de la bulgara komuno“. Botev mem verkas „Kredon de la bulgara komuno“ kaj atendas „la estontan komunisman sociordon en la tuta mondo.“



„Tio estas nia, la bulgara komunista manifesto, — diras k-do Todor Jivkov. — Aperinta en tempo, kiam Bulgario ankoraŭ ĝemis sub la kvinjarcenta fremda jugo, kiam ekzistis nek bulgara industria burĝaro, nek bulgara industria proletaro, tiu manifesto signifis, ke la bulgara renesanco, la bulgara naciliberiga movado ne haltos ĉe la nacia liberiĝo, ke ĝi nature kaj laŭleĝe kreskos en batalon por socia liberiĝo, por socialismo.“

La flago de la bulgaraj renesancaj revoluciuloj, faligita en la batalo, estis levita de la revoluciaj marksistoj. Armitaj per la ideoj de la scienca socialismo ili starigis je nova stadio la batalon por socia justeco kaj popola feliĉo.

Aparte kara por ni estas la flama internaciismo de Hristo Botev. Li firme kredis je la estonta frata unuiĝo de la liberaj popoloj, je „la unueca komuna forto de la homa gento sur la terglobo, kiu forto kreis bonon.“ Efektiviĝis ankaŭ tiu ideo de Botev. La unuiĝo de la popoloj, revita de li, hodiaŭ estas realaĵo de Elba ĝis la Pacifiko. La forto, serĉita de li, hodiaŭ estas enkorpiĝinta en la monda komunista kaj laborista armeo. La internaciismo estas ŝtala leĝo de nia socialisma socio, de la Bulgara Komunisto Partio — internaciismo socialisma, elprovita en la frata unueco kun la Partio de Lenin kaj la Lando de la Sovetoj, en la unueco de la komunistaj kaj laboristaj partioj en la mondo, en la batalosolidareco de ĉiuj fortoj de progreso kaj demokratio sur la tero.

Eĉ nur la revolucia faro de Hristo Botev estas sufiĉa, por ke li restu unu el la plej brilaj figuroj sub la bulgara ĉielo. Sed lia genio lumigis ĉiujn sferojn de nia socia vivo, aparte la sferon de nia nacia spirita kulturo. Ekde Botev la bulgara publicarto kaj la bulgara literaturo ne povis disvolviĝi alimaniere krom kiel revolucia publicarto kaj revolucia literaturo. Nur 20 versaĵojn postlasis lia genia plumo. Sed ili estas perloj kiel en la nia, tiel ankaŭ en la monda literaturo. La esenca patoso de la tuta poeta kaj ĵurnalista afero de Botev estas unu — flamanta alvoko al batalo por libero, justeco, popola feliĉo! Por ili indas fari ĉiun oferon — fordoni personan bonstaton, riĉecon, feliĉon, amon, la vivon. Kaj Botev donis personan ekzemplon pri tio: li rezignis pri ĉio sia, ekvivis nur kun la popola batalo. Kaj en la decida horo li ekstaris frunte de taĉmento el 200 bulgaraj bravuloj, trapasis Danubon, kisis la sanktan bulgaran teron ĉe la bordo apud Kozloduj kaj post vico da bataloj kontraŭ la sennombra malamiko pereis heroe en la hejma Balkanmontaro. Tiamaniere poezio kaj vivo plene kunfandiĝis. Kaj faris lin senmorta; kvazaŭ pri li estas diritaj la vortoj en lia balado „Ĥaĝi Dimitro“:

*Ja kiu falas por la libero,
mortas neniam! Pro li esploras
naturo, besto, nuboj kaj tero
kaj baroj mirakante lin gloras.*

Kun la Botev-versaĵoj surbuŝe, fariĝintaj amataj kantoj por la bulgaroj, la fidelaj popolaj gefiloj batalis kontraŭ la kapitalismo kaj monarkofaŝismo, ekstaris antaŭ pendumilo kaj kuglo, rigardis kuraĝe la morton. Lian nomon portis partizanaĵ taĉmentoj kaj brigadoj.

Kun liaj kantoj kaj nomo kreskas kaj viriĝas hodiaŭ nia junularo. Kun ili vivas kaj konstruas la socialiasmon en nia patrolando la tuta laborpopolo Botev estas por eterne en la panteono de la bulgara senmorteco.

RENKONTIĜU KUN ĈEĤAJ ESPERANTISTOJ EN ALBENA!

40 ĉeĥaj gesamideanoj somerumos de la 2-a ĝis la 16-a de septembro 1976 en Albena ĉe la Nigra Maro. Ili tre deziras kontaktiĝi kun bulgaraj kaj somerumantaj alilandaj esperantistoj.

Loĝloko en la tendoj de la granda kampadejo (grupo Kladno). Informojn postulu de la grupgvidanto Josef Vitek, prezidanto de la Ĉeĥa E-Asocio, poŝtkesto 25, 276 80 Mělník, Ĉeĥoslovakio.



Hristo Botev

JE LA DISIĜO EN JARO 1868

Ne ploru, panjo, ne plendu,
ke mi fariĝis hajduto,
hajduto kaj ribelanto
kaj lasis vin malfeliĉa
pri id' unua veadi!
Malbenu, panjo, malbenu
la turkan nigran ekzilon,
kiu nin junaj forpelis
en ĉi-sufokan fremdlandon
vagadi kaj suferadi
mizeraj, nudaj, senhejmaj!
Mi scias, panjo, vi ploras,
ĉar eble juna mi falos
ah, morgaŭ kiam transpasos
kvietan blankan Danubon!
Sed diru kion do fari,
se vi, patrino, min naskis
kun koro vira, bravula,
kaj, panjo, kor' ne toleras
rigardi turkon rabli
super la hejmo gepatra,
la hejmo, kie mi kreskis,
unuan lakton eksuĉis
kaj kie belamatino
nigrajn okulojn levadis
kaj kun balzama rideto
ilin en koron pikadis
kaj kie patro kaj fratoj
pri mi suferas, velkadas! . . .
Ah, vi patrino bravula,
pardonu min kaj — adiaŭ!
Mi kaptis jam la pafilon
kaj kuras al vok' popola
kontraŭ tirano malpia.
Por ĉio kara, amata,
por vi, por patro, por fratoj
mi luktos kontraŭ la turko
kaj. . . kion la sabro destino
kaj sorto, panjo, bravula!
Kaj kiam aŭdos vi, panjo,
kantantan kuglon ekstere,
kaj jam junuloj alsaltas,
eliru, panjo — demandu,
kie fil' via postrestis?
Se oni dirus, ke mi jam
falas per kuglo trafita,
eĉ tiam, panjo, ne ploru,
nek al la homoj atentu,
kiuj pri mi babilaĉos:
«Li sentaŭgulo fariĝis!»
Sed iru hejmen tuj, panjo,
elkore ĉion rakontu
al miaj fratoj junaĝaj,
ke ili sciu, memoru,

ke fraton ili ja havis,
sed frato falis, pereis,
ĉar plu ne povis toleri
antaŭ turk' kapon mallevi,
mizeron fratan rigardi!
Diru, ke ili memoru,
memoru min kaj serĉadu:
la blankan karnon sur rokoj,
kie la agloj ŝvebadas,
la nigran sangon — en tero,
en tero, panjo, la nigra!
Ke ili trovu la sabron,
la sabron kaj la pafilon,
kaj kiam vidos tiranon,
per kuglo lin eksalutu,
per sabro lin ekkaresu. . .
Se vi, ho, panjo, ne povos
pro ĉagren' fari eĉ tion,
eliru, kiam kunvenos
knabinoj por rondodanci
kaj venos miaj kunuloj,
kaj amatino malĝoja,
eliru, panjo, aŭskultu
kun miaj fratoj junaĝaj
pri mi la kanton bravulan —
kial kaj kiel mi falis,
parolon kian eldiris
antaŭ mort' al la anaro. . .
Vi larme, panjo, rigardos
al tiu gaja rondanco
kaj kiam trafos l'okulojn
de mia kor-amatino
profunde ja eksopiros
du koroj, por mi karegaj —
kor' ŝia, panjo, kaj via!
Kaj du ja larmoj surfalos
maljunan bruston kaj junan. . .
Sed tion fratoj ekvidos
kaj kiam, panjo, viriĝos,
samkiel frato fariĝos —
forte malamos kaj amos. . .
Se mi, patrino malĝoja,
viva kaj sana revenos
kun la standardo en mano,
bravuloj sub la standardo,
sveltaj en vesto soldata,
kun leonsignoj sur fruntoj
kaj kun pafiloj sur ŝultroj,
ho tiam, panjo bravula,
ho, kara koramatino!
Deŝiru florojn ĝardenajn,
hederon kaj geranion,
plektu florkronojn, bukedojn,
ornamu kapojn, pafilojn!

Tiam kun krono el floroj
 al mi vi, panjo, alvenu,
 alvenu kaj ĉirkaŭprenu,
 sur bela frunto min kisu,
 bela kun skrib' testamenta :
 »Liber' aŭ morto heroa !«
 Mi amatinon ekpremos
 per sanga brako al brusto —
 ke aŭdu koron batantan
 ploranta mia knabino :
 mi kise ploron ĉesigos,

mi buŝe larmojn eltrinkos. . .
 Kaj tiam. . . Panjo, adiaŭ !
 Vi, amo, min ne forgesu !
 Anar' ekiras, foriras,
 la vojo estas terura,
 tamen plej glora ĝi estas :
 mi eble juna pereos. . .
 Sed rekompenco sufiĉas,
 se diros iam popolo :
 mortis la kompatindulo
 por justo kaj por libero !

MIA PREĜO

„Benata dio mia . . .“

Dio mia, justa dio,
 ne vi en ĉiela foro,
 mi nur preĝas al vi, dio,
 kiun sentas mi en koro. . .

Ne vi, kiun priadoras
 pastroj kaj monaĥoj piaj,
 kiun per kandeloj gloras
 ortodoksaj brutoj niaj;

Ne vi, kiu el kot' faris
 viron kaj virinon lerte,
 tamen por la hom' preparis
 sklavan vivon sur la tero ;

Ne vi, kiu sanktoleis
 reĝojn, papojn, patriarkojn,
 kaj mizeran vivon kreis
 por malriĉaj miaj fratoj ;

Ne vi, sklavon instruanta
 preĝi dum suferoj krudaj,
 ĝis la tombo lin nutranta
 sole per esperoj nudaj ;

Ne vi, dio de l'trompuloj,
 de l'tiranoj malhonoraj,
 ne idolo de l'stultuloj,
 de la malamikoj homaj !

Sed vi, dio de l'racio,
 defendanto de la sklavoj,
 kies tagon la nacioj
 baldaŭ festos kiel savon !

Vi al ĉiu vivan amon
 al liber' insplu, dio,
 por ke kontraŭ la tiranoj
 de l'popolo luktu ĉiu !

Faru manon mian ŝtalo,
 armu min per fera forto :
 en la fajro de l'batalo
 trafu ankaŭ min la morto !

En fremdlando vi ne lasu
 ardan koron velki, dio —
 mia voko ne trapasu
 kvazaŭ tra dezerto krio ! . . .

El la bulgara : Ivan Dobrev

LA KREDO DE LA BULGARA KOMUNO

*Mi kredas je la unueca komuna forto de la homa gento sur la terglobo,
 kiu forto kreas bonon.*

*Kaj je la unueca komunisma sociordo, kiu per frata laboro, libereco
 kaj egaleco savos ĉiujn popolojn el centjaraj suferoj kaj turmentoj.*

*Ankaŭ je la hela vivokrea spirito de la racio, fortiganta la korojn kaj
 la animojn de ĉiuj homoj por la prospero kaj la triumfo de la komunismo
 per revolucio.*

*Ankaŭ je la unueca kaj nedisigebla patrujo de ĉiuj homoj kaj la komuna
 propreco super ĉiuj havaĵoj.*

*Mi kredas je la unusola hela komunismo — kuracanto de la sociaj
 malsanoj.*

*Mi atendas la vekigon de la popoloj kaj la estontan komunisman soci-
 ordon en la tuta mondo.*

Fristo Botev

Galac, la 20-an de aprilo 1871 j.



La unua poezia ero de Botev en la Internacia Lingvo aperis en 1906. Tio estas la versaĵo „Elegio“. Ĝin tradukis kunlaboranto de la entuziasma pionira E-gazeto „Unua Paŝo“ en Sofio redaktata kaj eldonata de grupo de junuloj, precipe studentoj. La nomo de la tradukinto kaŝiĝas modeste sub la inicialo „L“. La versaĵo aperis en la numero de la gazeto por majo, la monato, en kiu la bulgara revoluciema kaj progresema junularo celebras tradicie la datrevenon de la pereco de Botev.

La dua E-traduko de Botev-poeziaĵo estas la fama balado „Ĥaĝi Dimităr“. Esperantigis ĝin *Krăstju Trikjakin*, konata nomo en la bulgara E-movado, tiam ankoraŭ lernanto en Veliko Târnovo. La versaĵo aperis en la duobla numero por majo-junio 1908 de revuo „Lumo“.

Post la Unua Mondmilito kaj la venko de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio la batalema laborista movado, gvidata de la Bulgara Komunista Partio, elkreskis vaste kaj forte influis al ĉiuj progresemaj tavoloj. Esperanto penetris en la revolucionan laboristan medion. Tute nature estis, ke la progresemaj esperantistoj ĉirkaŭprenis la nomon de Ĥristo Botev kiel standardon en la batalo por pli bona socia ordo kaj penis konatigi al la mondo la verkojn de la genia poeto-revoluciulo.

Plej elstare prezentis la poezion de Botev en Esperanto la juna *Ivan Dobrev*, aktivulo de la Junkomunista Unuiĝo Bulgara, animo poetema, esperantisto arda. Lia unua traduko el Botev estas la versaĵo „Mia preĝo“, kiu aperis sur la paĝoj de revuo „Bulgara Esperantisto“ en marto 1921. La saman jaron sekvis tradukoj de la versaĵoj „Ĥaĝi Dimitro“ kaj „Batalo“. Ivan Dobrev tradukis Botev-poezion ankaŭ dum la sekvaj jaroj. En 1928 li aperigis preskaŭ la tutan poezion de Botev en aparta verskolekto sub la titolo „Versaĵoj“. Speciale por tiu eldono la portreton de la poeto pentris Deĉko Uzunov, nun tre fama bulgara artpentristo. La kolekto enhavas 17 el ĉiuj 20 poeziaj eroj de Botev. El ili 8 jam aperis en „Bulgara Esperantisto“ kaj de tie estis represitaj en aliaj periodaĵoj kaj kolektoj. Unuafoje ĉi tie aperis 9 poeziaĵoj.

La esperantista publiko renkontis la libron aĉrope. Aperis en la E-gazetaro tre favoraj recenzoj. „Bulgara Esperantisto“ emfazis: „Dobrev donis tradukon, kiu preskaŭ egalas la originalon. La tradukado de Botev estas malfacila, estas heroa laboro. Dobrev plenumis ĝin brilante.“

Tradukon el Botev faris ankaŭ *Kosta Mateev*, aktiva aganto de la Bulgara Komunista Partio en Plovdiv, gvidanto de la laborista E-grupo „Balkana Liberiga Stelo“ en tiu urbo dum 1920—1923, poste elmigrinta el la lando pro polica persekuto. Mateev tradukis la

felietonon „Tio ĉi vin atendas“, aperinta en „Bulgara Esperantisto“ en junio 1923.

Ivan Sarafov, meritplena funkciulo de la bulgara E-movado, partoprenanto en la revolucia laborista movado, tradukis la versaĵon „La pendigo de Vasil Levski“ kaj la artikolon „Ridinda ploro“ — forta defendo de la Pariza Komuno. Ambaŭ tradukoj aperis en la redaktita kaj eldonita de li „Botev-Folio“, speciala 4-paĝa E-eldonaĵo en junio 1924. Tio estis kuraĝa paŝo de Sarafov en la tempo de plej kruela faŝista teroro en la lando. Post jaroj al lia plumo apartenas la traduko de aro da Botev-prozaĵoj.

Stefan B. Kojumĝiev el Pleven, aktiva komunista aganto, partoprenanto en la laborista E-movado, esperantigis la ardan apoteozon de la Pariza Komuno „Ridinda ploro“. Ĝi aperis en gazeto „Sennacieca Revuo“ en la numero por marto-aprilo 1927.

La elstara bulgara E-poeto kaj meritplena pioniro *Petăr Jordanov* tradukis la baladon „Ĥaĝi Dimitro“, publikitan en „Bulgara Esperantisto“, n-roj 1—2, 1934.

Alia elstara E-poeto kaj vaste konata aganto de nialanda kaj internacia E-movado — *Asen Grigorov*, ankaŭ interpretis Botev en Esperanton. En 1948 li aperigis en revuo „Internacia Kulturo“ la felietonon „Ridinda ploro“ kaj la versaĵon „Mia preĝo“. La tradukinto subskribis sin per la pseŭdonimoj B. Ivanov kaj M. Ljubin.

Kontribuon al la prezento de Botev en Esperanto faris ankaŭ nia esperantista poeto *Simeon M. Simeonov*. Li tradukis la versaĵojn „En la drinkejo“ (1968) kaj „Ĥaĝi Dimitro“ (1970).

La tradukoj el la Botev-verkaro estis multfoje represataj en la E-gazetaro kaj en diversaj kolektoj. Krom la ĝis nun menciitaj E-periodaĵoj, verkoj de Botev aperigis ankaŭ: „Balkana Laboristo“ (1929), „Studenta Fronto“ (1947), „Nuntempa Bulgario“ (1957), „Internacia Ĵurnalisto“ (1962), „Paco“ (1973). Botev-verkoj troviĝas ankaŭ en jenaj kolektoj: „Ni legu!“ (Internacia legolibro — SAT-eldono de 1923, 1924, 1927), „Proletaria Kantaro“ (SAT-eldono de 1924), „Bulgara Antologio“ (1925), „Mallonga kurso de Esperanto“ de Sarafov (1925), „Legolibro de Sarafov (1946), „Esperanta Krestomatio“ de Sim. M. Simeonov (1968), „Esperanta Legolibro“ de Sim. M. Simeonov (1968), „Flugas kanto tra la mondo“ (1968).

En 1969 denove aperis kolekto de Botev en Esperanto sub titolo „Elektita verkaro“. Ĝin eldonis la fremdlingva eldonejo „Sofia-Press“. Ĝi ampleksas 83-paĝojn. La kolekto estas provizita je belega antaŭparolo de la elstara bulgara poeto Ĥristo Radevski, verkita speciale por tiu eldono. La poezia parto estas traduko de Ivan Dobrev. La prozan parton tradukis Ivan Sarafov.

La libro estis tre bone akceptita de la pub-

liko kaj la E-gazetaro. Revuo „Esperanto“ skribis: „Kion ajn prikantas Botev, la libero de lia patrujo ĉiam ĉefrolas, ĉar li ja estas granda revoluciulo kaj granda poeto, malgraŭ tio, ke nuraj 20 poemoj postrestis lin. Kaj la prozaĵoj, kvankam nur pri gazetartikoloj temas, ili estas vera malkovro! Brila menso, erudiĉiulo, polemikisto unuaranga, satiristo ponarde pika — kredus oni, ke ĉio ĉi estas verkita hieraŭ, kaj ne antaŭ la jaro 1876, kiam Botev heroe pereis. La tradukintoj bone plenumis

certe malfacilan taskon.“

La plej tradukita kaj disvastigita poeziaĵo de Botev en Esperanto sendube estas la balado „Ĥaĝi Dimitro“ — tri tradukoj en 15 represo (13 el ili de la traduko de Ivan Dobrev). El la prozaĵoj „Ridinda ploro“ havas same tri tradukojn (6 — represo).

Pri la heroo vivo kaj la poezio de Ĥristo Botev aperis en Esperanto deko da artikoloj, eĉ belartaĵoj, sed ilia pritrakto prezentas alian temon.

Krâstju Karucin

Ĥristo Mindov

KALIAKRA

Bela milda vespero ekfalis sur la ebenaĵon. Dum tiuj vesperoj de Dobruĝa, al kiuj nek arbaroj, nek montoj malhelpas vaste etendi sin, ĉio silentiĝas, ĉiu sono, ĉiu krio formortas en la ebenaĵo, kaj la apenaŭ faldita tero kvazaŭ ekdormas pro la multa suno kaj lumo. Vi marŝas tra la ebenaĵo kaj ĉiuflanke vin ĉirkaŭas maturaj grenoj, maizo, kanabo, kaj super vi etendiĝas la vasta Dobruĝa-ĉielo, supersutita nokte de steloj. Vi marŝas en la vespera silento kaj aŭskultas, kiel la griloj ĉirpas — mallaŭte, dormeme, sinforĝese, kvazaŭ la ebenaĵo mem ekdormas kun kanto.

Tra tiuj lokoj la jaroj kaj la jarcentoj lasis siajn spurojn. En la komenco de la kvina jarcento antaŭ nia erao tien ĉi invadis la scitoj. Poste — la gotoj, hunoj, visigotoj, nomadoj. En la maro ĉirkaŭnavigadis la feniciaj galeoj. En 395 jaro Dobruĝa estas helena posedaĵo kaj la nigramara regiono estas supeŝutita per helenaj kolonioj; oni konstruas ankaŭ la fortikaĵon Kaliakra. Lizimat, militestro de Aleksandro la Macedona, konkeras kaj rekonstruas la fortikaĵon. La romianoj kreas loĝlokaĵojn centrojn por siaj garnizonoj. En la komenco de la sesa jarcento venas la slavo. Pro la multaj valetoj kaj fortikaĵoj, konstruitaj de diversaj popoloj, Dobruĝa estas nomata Lando de la Cent Altaĵoj. Je la fino de la sepa jarcento ekaŭdiĝas brutotado de ĉevaloj, tintado de armiloj, kaj grandstaturaj brunhaŭtaj viroj kun

razitaj kapoj kaj pendantaj lipharoj invadas la ebenaĵon. Tio estas la rajdantoj de Isperiĥ. Li ektiras la kondukilojn de la ĉevalo, leviĝas sur la piedingo, metas manon sur la frunton kaj ĉirkaŭrigardas la ebenaĵon.

— Tie ĉi! — li diras kaj esprimas la ĉevalon.

Dobruĝa fariĝas bulgara lando.

Dum sia ekzistado la bulgara ŝtato estas malkvieta. En ĝi agas decentrigaj fortoj, ili deŝiras teritoriojn, formas feŭdajn bienarojn. Ĉirkaŭ la dekkvara jarcento en Dobruĝa Balik kreis sendependan princlandon, kun ĉefurbo Karvuna kaj Dobruĝa eknomiĝas Karvuna-Lando. Post Balik en Dobruĝa regas Dobrotica, poste — Ivanko. Ivan Aleksandâr dividas sian regnon inter siaj tri filoj, malfortigas ĝin kaj ĝi fariĝas predo de la turkoj.

Komenciĝas la tragedio de Kaliakra, nomita de la helenoj Piriza, de la romianoj — Akra, de la bizancanoj — Kaliakra, de la bulgaroj — Kalacerka kaj laŭ la legendo — Kvardekjunulina Fortikaĵo, memore al la kvardek bulgaraj junulinoj, kiuj sin ĵetis en la maron por ne esti perforte malhonorigitaj de la turkoj, invadintaj en la fortikaĵon. La fortikaĵo estas nomata ankaŭ Tistris, Galeri, Galjari. Ĝi estas alta, rekte staranta fortikaĵo, antaŭeniginta en la maron, kies trompa profundeco malkovriĝas malsupre, kie la ondoj tondre diseriĝas. Tri fosaĵoj kaj tri viroj da muro ĉirkaŭis la fortikaĵon. La



tria muro havis moveblan ponton kaj tri enirejojn. Ĉe unu el ili estis du ŝtonaj leonoj kaj bareliefo de bulgara militanto kun ĉapelo el la tempo de ĥano Krum.

*

Post kiam en 1392 jaro la turkoj konkeras la regnon de Târnovo kaj en 1396 disbatas la regnon de Vidin, ili ekminacas ankaŭ Dobruĝan. La bulgara soldataro iras por renkonti la malamikon.

Pasas tagoj — neniaj sciigoj el la batalkampo. Poste ekcirkulas onidiro, ke la armeoj estas disbatitaj kaj la vojevodoj — murditaj, ke Preslavec kaj la fortikaĵo Midija estas konkeritaj, ke la turkoj ekofensivas tien-ĉi kaj ke el la direkto de Krimeo invadis tataaroj, kiuj forrabas kaj bruligas la urbojn. La ebenaĵo ekbolas pro maltrankvilo. La homoj ekkuras laŭ la vojoj. Tra la ebenaĵo ekveturas en sinsekva ĉeno veturiloj, premplenigitaj de infanoj kaj hejmobjektoj, ŝafaroj kaj brutaroj levas nubojn da polvo. Tra la pordego de la fortikaĵo eniras Kaliakra-n forkurintoj.

Iun tagon ĉe la horizonto aperas rajdantoj, kiuj okulesploras la fortikaĵon. Post tio komencas ofensivon densa amaso da soldatoj kun tamburoj kaj hobojoj. Post ili, ĝis kie la ebenaĵo etendiĝas, kolosaj flamoj lekas la ĉielon. La turkoj eksieĝas la fortikaĵon el ĉiuj flankoj. Laŭte timpanas la tamburoj kaj fajfaĉas la hobojoj.

Komenciĝas la defendo de Kaliakra. La turkoj starigas ŝtuparojn kaj surgrimpas la muron. Krioj kaj buĉado. La

sieĝantoj altrenas grandegan trabon kaj komencas frapi per ĝi sur la pordon de la fortikaĵo. La pordo rompiĝas. Kun sovaĝaj krioj la turkoj invadas la fortikaĵon. Komenciĝas amasbuĉado kaj incendioj. Malbonaŭgure hurlas la hundoj, tondras la tamburoj, fajfaĉas la hobojoj.

Kvardek junulinoj de Kaliakra, la plej belaj, kun haroj brunaj kiel la greno de Dobruĝa kaj okuloj bluaj kiel la ĉielo, vestitaj en bunte broditaj roboj de fajna tolaĵo el blanka kaj flava silko, pelataj de la teruraj tondroj de la tamburoj kaj la hurlado de la hobojoj, ekkuregas al la plej alta parto de la fortikaĵo, kie profunde en la marsupro faŭkas la blua karno de la maro. Ili ligas siajn harplektaĵojn unu kun la alia, decidintaj morti, sed ne permesi malhonorigon. Maljuna pastro svingas incensilon kaj faras krucsignon sur iliajn fruntojn. La junulinoj ekflugas el la roko. La maro malfermas abismon kaj akceptas ilin. La pastro svingas la incensilon al la maro, post kio ankaŭ li sin ĵetas el la roko.

Ŝtono sur ŝtono ne restas el la fortikaĵo. Super Kaliakra ekregas la terura silento de detruo kaj morto. Restas nur la legendo.

Sed nokte, kiam la maro kvietiĝas, kaj la luno ekarĝentas la ondojn, el la maraj profundoj elnaĝas la junulinoj de Kaliakra, sidigas sur la rokojn, malplektas siajn harojn kaj kantas. Kantas ĝis kiam la kokoj ekkokorikas kaj la luno subiras. Tiam ili denove malaperas en la marprofundojn. . .

El bulgara: Rajna Konstantinova

Klubo de la esperantistoj-kolektantoj „Amika Rondo“ — sekcio de Bulgara Esperantista Asocio, eldonis stencilitan libreton sub titolo „*Esperanto en filatelo — gvidilo por kolektado je temo „Esperanto“*“. Prezo por Bulgario — 40 stotinkoj, por socialismaj

landoj — 50 sovetaĵ kopejkoj aŭ egalvaloro, por aliaj landoj — 4 respondkuponoj. Ĉiuj rajtas anstataŭigi la sumon per egalvaloraj esperantaĵoj aŭ bildkartoj pri la temo „Arto“.

Liverebla je adreso: „Amika Rondo“, p. k. 5, 1113 Sofio, Bulgario.

KOLOMANO KALOCSAY

Forlasis por ĉiam niajn vicojn Kolomano Kalocsay, — la plej granda figuro de la Esperanto-movado en la nuntempo.

Li naskiĝis la 6-an de oktobro 1891, doktoriĝis pri la medicina scienco en



1916, estis ĉefkuracisto en budapeŝta hospitalo por infektaj malsanoj, profesoro de la medicina fakultato. Esperantisto ekde 1913.

Jen kiel redonas lian vortportreton la Enciklopedio de Esperanto, I-a eldono:

„Alta, facilgesta viro, kun moviĝemaj manoj kaj tre karakteriza kapo, profundaj brunaj okuloj, alta nuda frunto kaj ĉio substrekita de ironia, iom diabla ridostreĉo de la lipoj; li parolas per velura voĉo.“

Tiun ĉi portreton mi povas kompletigi per tio, ke kiam antaŭ deko da jaroj mi vizitis lin en lia budapeŝta hejmo (li estis tiam ĉ. 75-jaraĝa), kaj precipe kiam li komencis voĉlegi partojn de sia tiutempe lasta traduko

de „Reĝo Lear“ (Lir) de Shakespeare (ŝekspir), li montris sin tiel flamanta, tiel junkora, recitis kun tia profunda sento, ke mi forgesis pri lia granda aĝo kaj vidis nur la inspiritan vervan poeton. Tiam mi ekmemoris pri lia ĉiam valida konsilo: antaŭ ol definitive redakti poeziaĵon, voĉlegi ĝin por konvinkigi pri la fluado de la vortoj, pri ilia sonoro, pri manko de stumblolokoj, por konstati la internan ritmon de la legata teksto, kiu en Esperanto estas ordinare nemankipova kaj bone esprimita.

Kalocsay estis poligloto. Li libere tradukis ne nur el la modernaj grandnaciaj lingvoj kiel germana, franca, angla, rusa, hispana, sed ankaŭ el la klasikaj latina kaj malnovgreka lingvoj. Li estis klare konscia, ke Esperanto ne nur devas havi sian originalan literaturon — pri tio li donis multajn pruvojn, komencante per la poemaro „Mondo kaj koro“ (1921) kaj finante per „Streĉita kordo“ kaj multaj originalaj versaĵoj, dissemataj en Esperantaj gazetoj kaj prezentantaj veran trezoron laŭ sia profunda poeta sento, laŭ sia artismo kaj belsoneco. Ĉi tie mi volas akcenti pri la loko de tradukisto, kiun li senhezite kaj konstante okupis ĝis sia lasta spiro kiel redaktoro de „Hungara vivo“. Se oni legas eĉ supraĵe la nekompletan liston de liaj tradukoj el deko da lingvoj: „Kantanta kamparo“ (traduko de cento da hungaraj popolkantoj), „Johano la Brava“ de Petöfi, „La tragedio de l'homo“ de Madach, „Morgaŭ matene“ de Karintty, „Eterna bukedo“ (internacia antologio), „La infero“ de Dante, multego da poeziaĵoj aperintaj en „Hungara Antologio“ k. a., oni povas imagi la grandiozan laboron — kvantankaj kvalitan, — kiun li faris por konfirmi sian tezon pri la grava rolo de Esperanto kiel traduklingvo, por reprezenti en Esperanto multajn verkojn de la



hungara poezio kaj iujn el la ĉefverkoj de la monda literaturo.

Pri Kolomano Kalocsay oni devas multe skribi: pri lia lingvokreado, pri liaj gramatikaj, sintaksaj kaj stilistikaj verkoj. Mi volas atentigi ankaŭ pri la socia fenomeno Kalocsay — pri lia aparteno al la plej humana kaj plej progresema movado de la mondo — la komunisma movado. Liaj versaĵoj el la ciklo „Tra la ŝtormo“ kaj multaj el liaj verkitaj dum la lastaj jaroj: „Patrujo mia“, „Senrezerve“, „La mesaĝo de Nazim Hikmet“ k. a., liaj tradukoj de „Laborista Marsejlezo“, „Popol' titan'!“, „Fratoj, al sun'!“, „La

proletoj“ k. a., klare montras lian rilaton al la plej tiklaj problemoj de la nuna mondo — la problemoj de demokratio, paco, progreso kaj monda kulturo, kies arda porbatalanto li restis ĝis la lasta spiro de sia multjara, fruktoporta kaj ekzemplodona vivo.

Kolomano Kalocsay plenumis honeste kaj senreste sian devon de homo kaj esperantisto. Ni, postvivantoj, povas nur danki pro lia granda kaj grava laboro kaj promesi sekvi lian vojon al pli hela, senmilita, prospera estonteco de la tuta homaro.

Asen GRIGOROV

Kolomano Kalocsay

SUB MOSKVO

La gotojn portis ega fortostreĉo
sub Moskvon, kaj, jubile pri l'atingoj,
ili sin puŝis plu en duonringoj,
por rabi tiun urbon per sieĝo.

Sed ilin juĝis historia leĝo:
rompiĝis honte la orgojlaj svingoj,
kaj kuŝas nun centmiloj da vikingoj
anakronismaj sub la dika neĝo.

Stultulojn trompis kolportitaj ŝajnoj,
kaj ili klaĉis, ke en ses semajnoj
sterniĝos sur la ter' la landgiganto,
enmarŝos Moskvon Pli-Ol-Napoleono...
Kaj jen, montriĝis la mondkonkeranto
azeno en la felo de leono.

PRI NIA KOR'

Ni esfu fieraj, fratoj,
pri nia kor',
pri ĝiaj doloraj batoj!
Ĉar estas la bat' dolora
en nia kor'
pro tuta la mond' senkora.
Nin mok' kaj malam' rigardas,
sed nia kor'
nur amon rebrilas, ardas.
En vintro de l'tempo nuna
jen nia kor' —
ĝi estas la brilo suna.
Frostiĝas nun sent' kaj larmo...
Sun' — nia kor' —
vanluktas kun la malvarmo.
Sed venos, ho venos tempo
por nia kor' —
ni fidu je la printempo!

KALOCSAY AL LA BULGARAJ ESPERANTISTOJ

En 1972 j. petite de la prezidanto de BEA Nikola Aleksiev, la elstara hungara E-poeto kaj verkisto Kalocsay diris la jenajn vortojn al la bulgaraj esperantistoj:

Aŭdinte pri Bulgario tuj venas en mian kapon tiuj tempoj, kiam mi kunlaboris kun la karmemora I. H. Krestanov pri la „Bulgara Antologio“, kaj estis al mi granda ĝojo, kiam mi vidis, ke William Auld prenis kiel moton por sia poëmlibro „La infana raso“ citaĵon el poemo de Ĉilingirov.

Poste venis la epoko de la „Internacia Kulturo“, en kies batalo por demokratio kaj kontraŭfaŝismo mi partoprenis, eĉ se modeste, per kelkaj miaj artikoloj kaj originalaj poemoj.

Fine mi rememoras pri la ĝojo, kiun donis al mi ĉiu numero de „Nuntempa Bulgario“ kun siaj belaj koloraj bildoj pri ora plaĝo, marmorbrilo de konstruaĵoj kaj pri la antikva heredaĵo el la tempo de Orfeo.

Jen kial mi ĝojas, ke la gvido de MEM nun rezidas en Bulgario. Ĝi estas tie sur ĝusta loko kaj en ĝustaj manoj.

Vivu la paco, vivu la socialismo, vivu Bulgario!

K. KALOCSAY



Vasil Vasilev Jovčev naskiĝis la 24-an de septembro 1915 en u. Ŝumen. Kreskinta en malriĉa laborista familio, kies domo troviĝis en la urba periferio, li jam tre juna trovis sian lokon inter la partoprenantoj de la marksismaj-leninismaj rondoj en la tiama knaba gimnazio. Pro aktiva partopreno en la striko de 1932 j. li estis eksigita el la gimnazio. Post unu jaro Vasil denove estis lernanto kaj ankoraŭ pli arde plenumis siajn taskojn kiel membro de RMS (junkomunista organizaĵo). Sed en la vintro de 1935 okazis fiasko kaj li kune kun aliaj lernantoj estis arestita kaj kondamnita al mallibereco. Oni liberigis lin post du jaroj.

Vasil estis elektita kiel membro de DK de RMS kaj komencis aktive labori por restarigo de la organizaĵo. Samtempe li plenumis gravajn taskojn de BKP, kunportante sekrete dokumentojn el Ŝumen al Ruse.

Vasil ĉiam estis scivolema pri la vivmaniero de la aliaj popoloj, aparte li interesiĝis pri la konstruado de nova vivo en la Soveta Lando. Tial en la aŭtuno de 1937 li komencis lerni la Internacian Lingvon en kurso, organizita de E-societo „Vekiĝo“ en Ŝumen, kies gvidanto estis la E-veterano Ilija Silvestriev. En la kurso tiam lernis

precipe progresemaĵoj junuloj-laboristoj kaj studentoj el la pedagogia instituto kiel Nenko Ĉendov — nun bulgara ambasadoro en Portugalio, Georgi Konstantinov — nun laboranta en DK de BKP en Ŝumen, Radoslav Canev, Ljuben Kaŝĉiev, Milka Kaŝĉieva k. a. Vasil Jovčev diligente lernis Esperanton kaj sukcese finis la kurson. Li ĉiam kaj ĉie varme propagandis la lingvon.

Post la barbara invado de hitlerana Germanio en Sovetunion Vasil Jovčev estis internigita en la koncentrejon de Krâsto Pole, de kie li eliris novembre 1943. Dum tiu tempo en Ŝumen-distrikto agis la partizana taĉmento „Avgust Popov“. La 7-an de aprilo 1944 Vasil Jovčev trovis la vojon al ĝi kaj fariĝis partizano.

Post la liberiĝo el la monarkofaŝismo je 9. IX. 1944 li eklaboris kun ĉiuj fortoj por firmigo de la nova popola sociordo en unu el la plej malfacilaj sektoroj — kiel estro de la Ŝtata Sekureco en Ŝumen.

Ĉiam en la unuaj vicoj, li tute ne ĉesigis la batalon kontraŭ la malamikoj de la nova, demokratia popola ŝtato. La printempon de 1946 li pereis en pafbatalo kontraŭ ili.

Cvjatko Todorov

ORGANIZA VIVO

BRILA JUBILEO DE „LUMO“

Nur tiel oni povas nomi la solenaĵon okaze de la 80-a datreveno de E-societo „Lumo“ en Veliko Târnovo, unu el la plej malnovaj E-societoj en Bulgario. Ĝi okazis la 15-an de majo. La salono de la Domo de Sindikatoj estis plenplena. Venis gaste esperantistoj el la ĉefurbo kaj el multaj distriktoj de la lando.

En la prezidantaro sidis reprezentantoj de politikaj kaj sociaj organizaĵoj de Târnovo: Manol Mančev — el UK de BKP, Marija Bakalova — prezidantino de UK de la Patrolanda

Fronto, Gospodin Gospodinov — vicprezidanto de la Urba Soveto, Atanas Georgiev — estro de fako „Klerigo“ ĉe la Urba Soveto, Stefan Conev — el UK de la batalantoj kontraŭ faŝismo, docento Angel Davidov — el la Universitato de V. Târnovo, Kunčo Valev — sekretario de CK de BEA, reprezentantoj de pli grandaj E-sociejoj.

Raporton pri la 80-jara vivo kaj agado de E-societo „Lumo“ faris Ĥristo Dolĉinkov — sekretario de DK de BEA en V. Târnovo.

Post la raporto sekvis salutoj. En la nomo de la organizaĵoj kaj la socio de V. Târnovo salutis varme Maria Bakalova. Ŝi substrekiis, ke la agado de la esp-toj estas rekonata en la konstruado de la socialismo en nia lando kaj en la batalo por defendo de la paco. En la nomo de BEA salutis Kunĉo Vălev. Li enmanigis donace al „Lumo“ skribmaŝinon kaj dekoris la brustojn de veteranoj kaj aktivuloj de „Lumo“ per la ora, arĝenta kaj bronza insignoj de BEA. Sekvis salutoj de reprezentantoj el Sofio, Varna, Ruse, Ŝumen, Preslav, Vărbica, Trjavna, Haskovo, Loveĉ, Vraca, Kazanlâk, Măgliŝ, Sviŝtov.

Oni informis, ke estas ricevataj 200 salutleteroj el eksterlando. Estis senditaj saluttelegramoj al CK de BKP kaj CK de BEA.

La oficiala parto estis filmita kaj surbendita. Sekvis riĉa belarta programo, kiun partoprenis E-artkolektivo el la Ekonomia Tekni-

kumo de V. Târnovo subgvide de Penka Kateva, danckolektivo, unuopaj recitantoj. Poste — komuna vespermango kaj amuzado, ĝis malfrua horo.

La sekvan tagon oni vizitis la lernejon „Nikola Vapcarov (iama „Ekzarĥ Josif I“), kie la 5—6-an de aŭgusto 1907 okazis la unua kongreso de la bulgaraj esperantistoj kaj estis fondita la Bulgara Esperantista Ligo (la nuna BEA). Estis inaŭgurita memorplato, kiun la dankemaj kaj merite fieraj „lum“-anoj starigis.

Enkadre de la jubilea celebrazo estis aranĝita ekspozicio pri la historia vojo de „Lumo“, kiun la publiko kun granda intereso trarigardis.

La celebrazo donas novan antaŭenpuŝon de la esperantistoj de V. Târnovo — tiu lulilo de la E-movado en nia lando.

N. Najdenov
prezidanto de „Lumo“

80-JARIĜO DE E-SOCIETO »LUMO« EN VELIKO TÂRNOVO

El la raporto de Ĥristo Dolĉinkov

Esperanto trovis ardajn adeptojn en V. Târnovo tuj post sia apero. En la urbo jam estis rondo de amikoj de la lingvo Volapük, inter kiuj ankaŭ mitropolitino Kliment — la konata aŭtoro de «Malfeliĉa familio» kaj «Ivanko» Vasil Drumev. Kiam ekbrilis la stelo de Esperanto, la volapükistoj tuj forlasis la malfacilan Volapük kaj varme brakumis la novan lingvon. Ankaŭ mitropolitino Kliment fariĝis esperantisto.

Laŭ iniciato de la apotekisto Nikola Zlatev jam en 1891 oni fondis en Târnovo E-Societon »Fulmo«. Mankas informoj pri ĝia agado, ĉar la arkivo forbrulis. Sed pro diversaj kaŭzoj ĝi ne estis sufiĉe stabila. En 1896 oni fondis novan societon — «Lumo», kiu restis ĝis hodiaŭ. En tiu tempo plej aktivan agadon disvolvas la instruisto Ĥristo Popov el Dolna Orjaĥovica — li faris multajn priesperantajn prelegojn en sia loĝloko, en Târnovo kaj aliaj loĝlokoj, eldonis lernolibron de Esperanto (1895), gvidis multajn E-kursojn. En 1900 el Rusio revenas Ĥristo Ĥaralambev, reganta perfekte la lingvon. En Târnovo kure kun siaj fratoj Nikola kaj Georgi li komencas viglan propagadon de Esperanto. Kreiĝas energia E-rondo — Ilija Zlatev, Ivan Nenkov, Angel Mirĉev, Dimităr Kasabov, Petko Mednikarov, Paskal Paskalev, Mladen Georgiev ka., kiu disvolvas fruktodonan agadon. La vivo de la esperantistoj estas riĉa — ekskursoj, renkontiĝoj, kunvenoj, vesperamuzoj, E-kur-

soj. Oni povas ĝuste diri, ke apostolo de la E-movado en antaŭmilita Bulgario estis Ĥristo Ĥaralambev.

En 1904 j. «Lumo» havis jam 70 membrojn — oficistoj, metiistoj, komercistoj, lernantoj. Hotelo «Rojal» ĉiumarde kaj ĉiuvendrede gastame malfermis siajn pordojn por iliaj kunvenoj.

En 1906 j. realiĝis la multjara revo de la esperantistoj en Târnovo — eldoni monatan gazeton. Ĝi havis la saman nomon «Lumo».

Je la 5—6 de aŭgusto 1907 en lernejo «Ekzarĥ Josif I» (nun «N. Vapcarov») okazis kongreso de la bulgaraj esperantistoj, kiun partoprenis 26 regulaj delegitoj el 14 lokaj kluboj kaj multaj gastoj. Post ŝtorma diskutado oni proklamis la kongreson unua. Ĝi fondis la Bulgaran Esperantistan Ligon (nun BEA). «Lumo» fariĝis organo de la Ligo. Kiel prezidanto de la Ligo kaj ĉefredaktoro de «Lumo» estis elektita Ĥristo Ĥaralambev. Sidejo de BEL estis Târnovo. La kongreso elektis d-ron Zamenhof kiel honoran prezidanton de la Ligo.

Post la kongreso komenciĝis vigla E-agado inter la junularo. Plej iniciatema kaj sindona montriĝis Panajot Hitrov — lernanto en la gimnazio. Oni komencis eldoni gaz. «Junulo» kaj dissendi ĝin senpage al la esperantistoj.

Dum la periodo de la militoj (1912—1918) la E-agado estingiĝis ĉie, ankaŭ en Târnovo.

Post la Unua Mordmilito komenciĝis aktiva E-vivo. Tiutempe plej elstaraj agantoj de la Movado en Târnovo estis Ivan Nenkov, Ĥara-

La Ŝtata Soveto honoris per ordeno „Kiril kaj Metodi“ — II grado la E-societon „Lumo“ en Veliko Târnovo lige kun ĝia 80-jariĝo kaj pro ĝia multjara populutila agado.

Iambi Bâcvarov, Ilija Zlatev, Anton Pomakov, Georgi Kamâkov, Pena Popova, Georgi Dončev, Mara Sâbeva, Stalijan Daniskov k. a.


En 1921 Esperanto estis enkondukita kiel fakultativa objekto en la knaba, knabina kaj komerca gimnazioj. Oni fondis du lerneajn E-societojn — «Flamo» en la knaba gimnazio kaj «D-ro Zamenhof» en la komerca.

KONCERTO DE MARIJA ANGELOVA EN SOFIO

La opera kantistino-esperantistino Marija Angelova jam estas tre konata per siaj partoprenoj en la universalaj kongresoj de Esperanto en Vieno (1970), Londono (1972), Beogrado (1973), Hamburgo (1974) kaj Kopenhago (1975).

La 23-an de aprilo 1976 ŝi denove ĝuigis la sofian publikon. Ŝia koncerto okazis en la halo «Slavejkov». Angelova plenumis multajn vaste ŝatatajn muzikpecojn. En la duetoj ŝi kantis kune kun la tenorkantisto Noj Nikolov.

En la programo estis: la ario de la papilio el la opero «Vereciaj solenaĵoj» de A. Campra, la ario de Venera el la opero «Tezej» de J. B. Ljuli, la kabinato de la grafino el la opero «La geedziĝo de Figaro» de V. A. Mozart, la ario de Kserks el la samnoma opero de G. F. Händel, la ploro de Frederiko el la opero «La arlezianino» de Fr. Cilea, la ario de Nemorino el la opero «Am-eleksiro» de G. Donizetti, duetoj el la opero «Don Paskuale», kaj aliaj de A. K. Gomes, G. Verdi, P. Leoncavallo, G. Donizetti. En Esperanto ŝi plenumis la arion de Amina el la opero «Somnambulino» de V. Bellini.



En tiu periodo en Târnovo okazis du naciaj E-kongresoj — en 1923 kaj en 1936.

El la vicoj de la esperantistoj en Târnovo eliris bravaj kontraŭfaŝistoj, kiuj heroe pereis en la batalo: d-ro Vârban Genčev — politika komisaro de la partizana taĉmento de Corna Orjaŝovica, Ĥristo Kozlev, poeto-partizano, Dimitâr Djulgerov, Todor Mollov, Botju Penev, Denjo Georgiev ka.

La koncertplenumon akompanis la konata pianisto Ĥristo Iliev. Multaj sofiaj esperantistoj ĉeestis la koncerton.

Nia kantistino M. Angelova ofte koncertas tra la lando. En siaj programoj ŝi plenumas ankaŭ kantojn en Esperanto. Tiamaniere ŝi praktike montras, ke Esperanto estas taŭga, same kiel la naciaj lingvoj, por ĉiuspeca kantado. Antaŭ nelonge ŝi koncertis en Târgoviște (vd. n-ro 5 de «B. E.», 1976) kaj en Haskovo.

Ĉi-jare M. Angelova denove prezentos sin kaj nian «landon de la kantoj» antaŭ internacia publiko en la 61-a Universala Kongreso de Esperanto en Ateno.

Minko Conkovski

„ESPERANTISTA PRINTEMPO“

La 8-an de majo E-societo „Balkana Stelo“ en Trojan organizis 4-an E-renkontiĝon, kiun multaj esp-istoj jam danke kaj ame nomas Esperantista Printempo. Ĝin partoprenis ĉ. 130 ges-anoj el diversaj loĝlokoj. La ĉi-jara interdistrikta renkontiĝo estis dediĉita al la 100-jariĝo de la glora Aprila Ribelo.

La oficiala parto okazis en la vasta kaj bonege aranĝita kunvenhalo de la Popola Soveto. Junpioniroj el lernejo „Ivan Haĝijski“ sub la gvido de K. Zlateŝka prezentis specialan por la celo belartan programon.

Sekvis salutparoladoj de reprezentantoj de E-societoj. Ĉiuj esprimis sian ĝojon pri la donita ebleco esti en agrabla esperantista medio kaj insistis, ke similaj renkontiĝoj fariĝu ĉiujara tradicio, ĉar ili estas rezultodona formo de plivigligo de la E-movado.

Sub la sonoj de bonega orkestro la amuzado daŭris ĝis meznokto.

La sekvan tagon al la gastoj estis konigitaj la vidindaĵoj de la urbo. Ili vizitis la muzeon de la artmetioj kaj aplikaj artoj, la muzeon de la kontraŭfaŝisma batalo, la faman Trojan—Monaĥejon kaj la Retrospektivan Ekspozicion en ĝi, la Ekspozicion de Mumiigitaj Bestoj en v. Ĉerni Osâm ka.

Ĉiuj disveturis kontentaj kun la deziro partopreni ankaŭ sekvajare la Esperantistan Printempon en la bela montara urbo Trojan.

V. Mitovski



LA EŜPERANTO-FLAĜO DENONE LEVITA EN ETROPOLE

Surbaze de junulara E-kurso, kiun gvidis dum kelkaj monatoj Temenuga Ovĉarova, kaj kun la helpo de UK de Komsomolo en nia urbo estis restarigita la loka E-societo „Kamaradeco“, kiu jam delonge ne aktivis.

Je la 13 de majo okazis kunveno, en kiu k-do Kunĉo Vălev — sekretario de CK de BEA, parolis pri la celoj kaj taskoj de la lokaj E-societoj. Li donis detalajn klarigojn pri la konkretaj taskoj, laborplano, agadformoj, estrarstrukturo ktp. de la E-organizaĵo en Etropole. Aparte li substrekis, ke unu el la plej gravaj kaj urgaj taskoj de la nova estraro estas eltrovi kaj unuigi ĉiujn esp-istojn en la urbo, ĉar nur tiel — kun la spertoj de la maljuna kaj la entuziasmo kaj la energio de la juna generacioj — oni povas atingi plej bonajn rezultojn.

Fine oni elektis estraron: prezidanto — Temenuga Ovĉarova, sekretario — Marija Zlateva, kulturkleriganto — Stefka Dakova, kasisto — Raĉo Ganĉev kaj membro — Stojan Krinĉev.

M. Zlateva

AKTIVA KONTRAŬFAŜISMA BATALANTO KAJ ESPERANTISTO — POPOLA ELEKTITO

Ĉi-jare por la esperantistoj de Târgoviște la tago 30 de majo restos neforgesebla: tago de la balotoj por popolaj reprezentantoj — deputitoj, sovetanoj, asessoroj.

Jam frumatene en la 20-a balotsekcio, troviĝanta en lernejo «Miĥail Petrov», svarmis diversaj civitanoj. Gaje, amike babilis la homoj, rido eksplodis. . . Festa bonhumoro regis. El la balotejo eliradis junuaj homoj — iliaj vizaĝoj brilis: ja unuafoje en sia vivo ili balotis. . .

Ĉirkaŭ la horo 8,30 la festhumoro aparte plialtiĝis: venis la kandidato por deputito k-do Sava Dălbokov. Kun li — kelkaj gvidantoj de la urbo: Georgi Karamfilov — kandidatmembro de CK de BKP kaj unua sekretario de DK de BKP, Toma Tomov — kandidatmembro de CK de BKP kaj prezidanto de la Distrikta Popola Soveto, Kina Topalova — eksa partizano,

OMAGE AL MAKSIM GORKIJ

La Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“ celebris la naskiĝtagon de sia patrono. Pri la vivo, agado kaj literatura verkaro de Gorkij parolis Ivan Draganov. Substrekinte lian grandan rolon kaj signifon por la kultura kaj literatura vivo de Sovetunio kaj la tuta mondo, Draganov aparte parolis pri Gorkij kiel amiko de Esperanto kaj la esperantistoj. Li citis multajn el liaj pensoj tiurilate. Interalie:

„Ĉu Esperanto estas utopio? Nun al la efektivigo de la utopio aliĝas multaj miloj kaj milionoj da homoj. Nun komuna internacia lingvo estas pli ol ĉiam necesa por la homaro. Se ni nur dezirus, ni povus multon fari. La neceso de komuna lingvo por la internacia proletaro venas el la unueco de la klasaj bezonoj kaj celoj de la proletaro. Laŭ mi, Esperanto estas tute kapabla evolui plu. Jam nun Esperanto havas sufiĉe vastan literaturon.“

La celebrego de M. Gorkij finiĝis per belarta programo, kiun partoprenis la aktorino-esperantistino Bjalka Beleva, V. Oljanov k. a.

nun prezidanto de UK de la Patrolanda Fronto, ka.

Kun ĝojo la civitanoj salutis k-don Dălbokov. Inter ili estis ankaŭ Stojan Ŝopov — sekretario de DK de Bulgara E-Asocio kaj prezidanto de la loka E-societo «Verda Eskadrono». Manpremanate kun k-do Dălbokov Ŝopov alparolis lin en Esperanto kaj tuj ricevis vigan reeĥon: k-do Dălbokov flue kaj kun videbla plezuro parolis la Internacian Lingvon. Nia prezidanto esprimis la pretecon de ĉiuj esperantistoj voĉdoni por li ne nur kiel merita kontraŭfaŝisto kaj eminenta nuntempa ŝtatestro, sed ankaŭ kiel bona esperantisto.

La mallonga konversacio en Esperanto impresis la gvidantojn de la urbo kaj la ceterajn civitanojn.

Dimitrinka Koseva

VESPERO PRI ĤRISTO MINDOV

Lige kun la tria jariĝo ekde la morto de la bulgara verkisto Ĥristo Mindov la Sofia E-Societo „M. Gorkij“ dediĉis specialan kunvenon. Ĉeestis ĝin ankaŭ estimantoj kaj parencoj de la verkisto, inter kiuj ankaŭ lia vidvino Anna Mindova kaj lia nevo — la ĵurnalisto Boris Mindov — ambaŭ esperantistoj.

Prelegon pri la vivo kaj verkaro de Ĥr. Mindov faris Rajna Konstantinova. Ŝi substrekis, ke la verkisto kun granda simpatio rilatis al la ordinara laborhomo el la popolo kaj juste lin pentris, ke multaj el liaj verkoj estas penetritaj de forta malamo al la milito kaj la

militinstigantoj kaj de amo al la interpopola amikeco kaj paco en la mondo. Multloke Mindov pentras ame batalantojn kontraŭ la monarkofaŝisma tiraneco. Sed antaŭ ĉio li estas pentristo-naturamiko. Liaj vojaĝpriskriboj estas plenaj je poezio kaj beleco, kaj oni legas ilin kun profunda emocio kaj estetika ĝuo.

Fine de sia prelego R. Konstantinova recitis la versaĵon „Jubilea“ de Ĥr. Raduŝev, dediĉitan al la verkisto, kaj legis fragmenton el la legendo de Mindov „Kaliakra“, kiun ni publikigas en ĉi tiu numero de „Bulgara Esperantisto“.

INTERDISTRIKTA E-RENKONTIĜO EN SAMOKOV

Je la 15—16 de majo en la bela apudmonta urbeto Samokov okazis amasa interdistrikta renkontiĝo de esperantistoj, dediĉita al la XI-a kongreso de BKP, la 20-jariĝo de la gravega Aprila Plenkonsido de BKP, la 100-jariĝo de la glora Aprila Ribelo de la bulgara popolo kontraŭ la otomana jugo kaj la ĉijara 39-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj. Krom el Samokov partoprenis esperantistoj el Sofio, Plovdiv, Blagoevgrad, Stanke Dimitrov, Bansko, Pazarĝik, Intiman, Marica, Jambol. Aparte impona estis la grupo el la malgranda urbo Gâlâbovo, distrikto de Stara Zagora.

La solenan inaŭguron de la renkontiĝo ĉeestis ankaŭ multaj reesperantistoj el Samokov. Malfermajn vortojn kaj bonvenigon al la gastoj direktis Georgi Ĉekurov — prezidanto de UK de Patrolanda Fronto en la urbo. Paroladon faris Ivan Keremidĉiev — Esperov, membro de CK de BEA kaj prezidanto de la Sofia E-Societo «Maksim Gorkij». Li parolis pri la historia vojo de la bulgara E-movado, aparte emfazante la agadon de la glora laborista E-Asocio (LEA) kaj la partoprenon de la bulgaraj esp-toj en la kontraŭfaŝisma batalo. Ankaŭ nun ili estas en la unuaj vicoj de la

konstruantoj de nova, feliĉa vivo en nia patrolando, sinceraj batalantoj por paco kaj interpopola amikeco en la tuta mondo.

Kortuŝa estis la momento, kiam grupo da junpioniroj salutis la kunvenintojn kaj enmanigis florojn al la prezidantaro. Salutis la kunvenon ankaŭ Kanjo Kanev el Gâlâbovo kaj donacis bildon al la loka E-societo «Rila Esperantisto».

Sekvis varia kulturprogramo, kiun gvidis la E-poetino Penka Papazova. Riĉan muzikprogramon plenumis la kanthoro de turistoj-veteranoj el Samokov, la mandolina orkestro ĉe legejo «Otec Paisij» en la urbo kaj individuaj amatoroj. Recitis versaĵojn Cvetanka Abdulska el Sofio, Angelina Popova kaj Kostadinka Borisova el Blagoevgrad. Proprajn verkojn recitis Penka Papazova el Jambol. Joĉjo Nikolov el Sofio kantis propraverkitan kanton.

Post la programo — dancoj, ludoj, amuzoj.

La dimnoĉon, post noktado en montodomo «Turista Bazo» en la ĉarma loko «Borovec» oni faris ekskurson per kablovojo kaj piede kaj ĝuis la pitoreskan panoramon de Rila.

Tagmeze — komuna tagmanĝo.

Minko Konkovski

EKSPOZICIO DE JUNA PENTRISTINO-ESPERANTISTINO

En aprilo nia juna samideanino Maja Gorova aranĝis en Sofio sian unuan memstaran ekspozicion. Dum la lastaj jaroj ŝi partoprenis per apartaj verkoj en naciskalaj ekspozicioj, sed nun ŝia talento vaste prezentis al la publiko siajn fruktojn. Ni kun ĝojo vidis unu maturan pentristinon, kiu majstre sugestas al ni grandajn kaj noblajn ideojn. Ekzemple

La milito finiĝis



en la bildo „La milito finiĝis” ni sentas la triumfantan ideon de la paco: la milito jam ĉesis furiozi, la vento dispelas la malhelajn nubojn, la suno lumigas la ĉambron de la homo kaj li, ĝis nun soldato, demetas la militvestaĵon — ĝi jam estas superflua. La homo havas la konkeritan eblon ordigi la vivon laŭ la leĝoj de la paco kaj libere ĝui ĝin. Tia bildo instigas la publikon veni pli rapide al la ideo, ke la militvestaĵo estu ĉiam superflua. . . Antaŭ tiu ĉi bildo oni povas longe stari kaj pensi.

Igi la publikon pensi — tio estas unu el la gravaj pozitivaj kvalitoj de la bildoj de Gorova, ĉar ĉiu el ili entenas ideojn, kiuj faras la verkon vera artaĵo. Eĉ antaŭ la senvivaj naturaĵoj de Gorova oni enpensiĝas. „La senvivaj naturaĵoj ankaŭ devas paroli pri la homoj, devas havi estetikan ideon” — diras la pentristino.

Oni devas substreki la pentristan memoron de Gorova, kiu permesas al ŝi pentri bildojn laŭ iam viditaj objektoj, sen havi ilin antaŭ si kiel modelojn. Dank’ al tio, estinte en Uzbekistan (USSR) nur 14 tagojn, post sia reveno en Bulgarion ŝi transformis la kolektilan materialon en belegajn artaĵojn.

Maja Gorova partoprenis komunajn ekspoziciojn ankaŭ en USSR, ĈSSR, Mongolio. Ŝi gajnis duan premion en la konkurso de l’Asocio de la Bulgaraj Pentristoj.



Vere, nur dum kelkaj jaroj (ŝi absolvis la Belartan Akademion en 1972) krei tiom da bildoj, partopreni kelkajn ekspoziciojn — tio estas laŭdinda, inspirita laboro. „La laboro estas senco de la vivo“ — diras la pentristino.

Maja Gorova estas esperantistino de sia junaĝo. Ŝi korespondas kun esperantistoj el Francio, Hungario, ĈSSR, USSR. Zorgeme ŝi parolas pri la ebloj kunlabori per Esperanto sur la kampo de la pentroarto.

Estas agrable vidi la pentristinon Maja, sed multe pli agrable estas paroli kun ŝi pri la arto. Komunikigema laŭ karaktero, ŝi estas tre interesa kunparolanto. Sed ŝi mem deklaras: „Mi esprimas pli bone min per la peniko, ol per la buŝo.“ Kaj vere en la bildoj de Maja ni vidas la helecon de ŝia vizaĝo, la optimismon de ŝia animo pli bone ol en ŝiaj vortoj pri la arto. Tio estas la optimismo de pentristo-filozofo,

Maja Gorova estas jam elkreskinta pentristino. Ŝi havas ĉion necesan por la granda arto — ideojn, saĝecon, majstrecon. Kaj ni atendas ĉiam pli sukoplenajn fruktojn de ŝia talento.

Dimitro Denĉev



Estimataj legantoj,

Al mi estas tre agrable renkontiĝi kun vi sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“.

Por mi, kiel juna pentristino, havas gravan signifon la konatiĝo kun la verkoj de grandaj majstroj, kiuj helpas min pli facile trovi mian propran vojon en la arto. Iliaj majstraj pentraĵoj riĉigas mian pentristan teknikon, donas al mi multajn ideojn, tiel necesajn por ĉiu juna pentristo.

Kiam mi studis en la belarta instituto, mi samtempe lernis Esperanton. La scipovo de la Internacia Lingvo malfermis al mi la vojon al internaciaj E-kongresoj. En la kongresuroj mi konatiĝis kun originalaj pentraĵoj de mondfamaj majstroj. Tiel dank' al Esperanto mi riĉigis mian kulturon kaj konojn en la pentroarto. Krom tio mi gajnis multajn amikojn-esperantistojn, kun kiuj mi interŝanĝas interesajn leterojn.

MAJA GOROVA

TRA LA E★ MONDO

SUKCESA KOMENCO

Ekde novembro 1975 en la Siberia urbo Krasnojarsk funkcias nova E-klubo. Ĝi havas 60 membrojn. Patronas kaj helpas la klubon la urba komsomola komitato. Dank'al tio la klubanoj jam ricevis bonan konstantan ejon en la urba Palaco de la Kulturo kaj aŭditoriojn por E-kursoj.

En la fakultato de sociaj profesioj ĉe la

universitato de Krasnojarsk estas malfermita E-fako.

Dum du jaroj la studentoj studas Esperanton kaj historion de la internacia lingvo kaj partoprenas praktikan internacian agadon. Post dujara studado ili povas fari ekzamenon kaj ricevi oficialan dokumenton pri instruado de Esperanto. La studado estas memvola. Nun la novan fakon vizitas ĉ. 36 gestudentoj. Gvidantoj de la instruado estas P. D. Agapov kaj E. A. Sudareva — instruistino de angla kaj germana lingvoj.

Dum la pasinta periodo la esperantistoj de Krasnojarsk dufoje prelegis pri sia agado kaj pri la internacia lingvo Esperanto per la regiona televido. En la urba Palaco de la Pioniroj aktivas la plej juna (laŭ sia konsisto) E-sekcio ĉe la Klubo de la internacia amikeco. Ĝin gvidas niaj aktivulinoj Galja Peškova

kaj Lena Blohina.

La esperantistoj de Krasnojarsk havas riĉan internan vivon: ili kunvenas, konversacias, kantas kaj muzikas, prelegas, studas. Tute ne eblas rakonti pri ĉiuj flankoj de la agado. Ni nur povas deklari: en tre malproksima angu-

leto de Siberio fondiĝis aktiva E-grupo, kiu starigas antaŭ si taskojn kaj plenumas ilin. Ankoraŭ unu fakto pri la progreso de la E-movado.

Vladimir Sapoŝnikov
prezidanto de la E-klubo en Krasnojarsk

60 membroj de la nova siberia E-klubo deziras korespondi kolektive kaj individue kun ĉi pri ĉi. Responde garantiita. Skribu amase al la komuna adreso: **Sovetunio, Siberio, 660075 Krasnojarsk, p. k. 2420, Esperanto-Klubo.**

SUKCESA SEMINARIO „ESPERANTO KAJ POP-MUZIKO“

La klubo de la esperantistoj ĉe la regiona biblioteko kaj la uzina klubo Merina en urbo Trenĉin (Ĉeĥoslovakio) organizis de la 23-a ĝis la 26-a de aprilo Internacian seminarion „Esperanto kaj pop-muziko.“

La partoprenantoj, precipe gejunuloj, estis venintaj el Pollando, Hungario, Bulgario kaj el diversaj regionoj de ĈSR. Evidente, por ili prezentis intereson la problemoj pri la rolo de la moderna muziko (speciale „kanto“) kiel rimedo por propagando de la Internacia Lingvo kaj movado inter la junuloj.

La tre bona organizo de la seminario montris la grandan deziron de la dommastroj de Trenĉin fari el tiu aranĝo unu preskaŭ malgrandan kongreson. Kaj ili sukcesis tiurilate.

La prezentitaj prelegoj de Bohumil Hanzel (ĈSR) kaj d-ro A. Pop (Rumanio) provokis

vigajn diskutojn precipe pri la grava rolo de la E-teksto de la modernitima kanto. La diskutoj daŭris plu en la salono de la bonege organizita E-diskoteko kaj dum ekskurso tra la urbo.

La kulturala programon partoprenis: kvarteto „Esperanto“ (ĈSR), ensemblo „Sebastianoj“ (Pollando), ensemblo „Trifolio“ (ĈSR) k. a. Speciale invitate partoprenis ankaŭ la artisto-kantisto Miŝo Zdravev, kiu tre sukcese prezentis novajn E-kantojn el sia repertuaro. La prospekto de la seminario dediĉis tutan paĝon por prezenti lin.

En la nomo de UEA la seminario estis salutita de la prezidanto H. Tonkin, kiu emfazis la signifon de la pop-muziko por la internacilingva kulturo.

Ĉiuj partoprenantoj esprimis la deziron, ke la seminario estiĝu ĉiujara tradicio.

DEZIRAS KORESPONDI TUTMONDE

Lernantoj 12—17-jaraj proponas korespondi kun ĉiuj landoj kaj interŝanĝi bk, pm. En ĉiu koverto ni sendas krom letero ankaŭ kanton, ŝercan versaĵon pri gramatiko, versan fragmenton el fabelo, anekdotojn, proverbojn. Post unu—du jaroj da korespondado ni povas inviti gaste korespondanton en Taŝkenton.

Skribu al la gvidanto de la Taŝkenta E-Klubo „Antaŭen“ je adreso: **Sovetunio, 700 125 Taŝkent 125, Visokovoltnij Masiv ul. Sajfulina 4, Romano Grinŝpan.** Leterojn sendu registritajn. En ĉiun leteron metu belan bk, afranku per belaj pm.

„V-a TTV“


La 4-an de aprilo la E-klubo en Viljandi — (Estonia SSR) organizis ŝercan feston — Tutmondan Tagon de la Viroj (TTV). Partoprenis ĝin ankaŭ gastoj el Riga, Tallinn, Tartu, Pärnu, Polva.

En la loka kulturdomo, ornamita per humoraj afiŝoj, estis prezentitaj humorprogramoj, okazis viktoriaĵoj, ludoj, dancoj k. a.

Ĉiuj viroj ricevis specialan insignon. Unuan fojon oni premiis per „TTV-pokaloj“. La unuan premion ricevis la fondinto de la festo el Riga Hano Anso. Premion ricevis ankaŭ A. Kilk pro plej interesa prezentita humuraĵo pri la estonta Esperanta aer-palaco en Tallinn.

Post kelkhora gaja kunestado oni konatigis al la gastoj la pasintcon kaj la nuntempon de Viljandi.

Sally Lomp



Entuziasme laboras la E-instruisto Ivan Korojev el u. Bijsk, Sovetunio.

Momento el lia leciono.



Verdaj ŝteloj

Ezopo

ORAJ OVOJ

Vivis iam ĉe la marbordo malriĉa homo. Li kolektis etajn helikojn, tre-dis kolĉenetojn kaj vendis ilin al somerumantoj. Iufoje tiu homo vendis sep kolĉenetojn kaj per la mono aĉetis kokinon el la bazaro. La kokino montriĝis benita. Ĉiutage ĝi komencis demeti po unu ora ovo por sia mastro. La malriĉulo mirkonsterniĝis. Kiam li plenigis tutan korbon per oraj ovoj, li vendis ilin al oraĵisto kaj ricevis korbon da ormoneroj. Per ili li aĉetis ŝipon. Enŝipiĝinte li ekveturis. La kokinon li kunportis en la kajuto. Post monato per la nove demetitaj ovoj li aĉetis duan ŝipon kaj ĝis la fino de la

jaro jam estis posedanto de dudek ŝipoj.

Ju pli riĉiĝis tiu homo, des pli avida li fariĝis. Foje li diris al si: kial mi ne havigu al mi ĉiujn ŝipojn en la maro? Mia kokino ĉiutage demetas oran ovon. Mi buĉos ĝin kaj eligos la tutan oron. Dirite — farite. Buĉinte sian orliverantan kokinon la avidulo trovis en ĝi nenion alian krom stomako, pulmo kaj koro. Tiam li premis sian kapon malespere. Post kelka tempo la ŝipoj dronis, kaj li restis sola sur la marbordo, malriĉa kiel antaŭe.

Rerakontis: *Angel Karalijĉev*

El bulgara: *Nikola Tarakĉiev*

Ne estas ordonpovo super tiu kapo, kiu pretas apartiĝi de la ŝultroj je la nomo de la libereco kaj por la bono de la tuta homaro.

HRISTO BOTEV (1848—1876)

La 5-an de aprilo en Plovoiv forpasis, nur 41-jara

Nikola K. Tarakĉiev

Peza estis lia sorto. Jam infano li grave malsaniĝis kaj restis senmova. Sed li estis tre sciamas kaj kapabla. Ellerninte perfekte Esperanton la junulo eniris novan mondon de vig-laj internaciaj kontaktoj kaj kultura interŝanĝo.

Dank' al sia vasta korespondado kaj kunlaborado en „Bulgara Esperantisto“ Tarakĉiev ekhavis amikojn en multaj landoj de la mondo.

Lia sindona kaj rezultiĉa pli ol 20-jara laboro por la disvastigo de Esperanto estas estiminda kaj imitinda.

La Redakcio

La 15-an de aprilo forpasis 68-jaraĝa la multara estrarano de la E-klubo en Viljandi (USSR)

Hano Anso

Li estis fervora kaj fajranima esperantisto iniciatinto de la humura festo Tutmonda Tago de la Viro.

Esperanto-kurso por fotistoj en Ruse. Kursgvidanto Georgi Dobrev



DE JARCENTO AL JARCENT'

Kanto de la III Festivalo de la soŭeta kaj bulgara Junularoj

Teksto: V. Firsou

Muziko: I. Luĉenok

Modere, majeste

f Pu-ra res-tos la ĉi-e-lo su-per Mos-ko kaj So-fi?

Gvi-dus ki-en ajn vin ce-lo, kan-tos

cresc.
mf ku-ne mi kaj vi. Nin ĝoj-ig-as far' ŝa-ta-ta,

gran-da es-tas ni-a fort? Ha-vas ni la voj-on

fra-tan, ha-vas ni la voj-on fra-tan i-ri

Refreno: Più mosso
f ku-ne en kon-kord? So-nas kan-te

fra-ta sent': „De jar-cen-to al jar-cent'!“ So-

nas kan-te fra-ta sent': „De jar-cen-to al jar-

cent'!“

Pura restos la ĉielo
super Moskvo kaj Sofi'.
Gvidus kien ajn vin celo,
kantos kune mi kaj vi.
Nin ĝojigas far' ŝatata,
granda estas nia fort'.
Havas ni la vojon fratan,
havas ni la vojon fratan —
iri kune en konkord'.
Refreno:
Sonas kante frata sent':
„De jarcento al jarcent'!“

Belas ĉe amik' rideto,
belas ĉe amik' anim'.
Ŝipka montras vojon pretan
al frateco kaj estim'.
Nin ĝojigas far' ŝatata,
granda estas nia fort'.
Havas ni la vojon fratan,
havas ni la vojon fratan —
iri kune en konkord'.
Refreno:
Sonas kante frata sent':
„De jarcento al jarcent'!“

El la rusa: Adam Pavlukovec

